STATUTO
de
DANA ESPERANTO-ASOCIO

1. Nomo kaj aparteno

1.1 La nomo de la asocio estas dan-lingve: Esperantoforeningen for Danmark (EFD). En Esperanto: Dana Esperanto-Asocio (DEA).

1.2 La asocio devas esti aligita al la monda Esperanto-asocio Universala Esperanto-Asocio (UEA).

1.3 La asocio estas fondita la 6-an de februaro 1908.

2. Celoj

2.1 La celoj de Dana Esperanto-Asocio (DEA) estas:
- progresigi la komprenon pri la indeco de egalvaloro kaj egal-rajteco en internacia komunikado;
- labori por ke la transnacia lingvo Esperanto estu ĉiam pli vaste aplikata por komunikado inter homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj.

2.2 La laboro konsistu unuavice el:

2.2.1 disvastigado de la konateco de Esperanto kaj de la rezultoj iam ajn atingitaj per apliko de ĉi tiu lingvo;

2.2.2 progresigo de la instruado de Esperanto;

2.2.3 progresigo de la praktika utiligo de la lingvo;

2.2.4 perado de dana kulturo al la eksterlando kaj de eksterlanda kulturo al Danlando helpe de la lingvo;

2.2.5 plutenado kaj plukonstruado de efika organizaĵo laboranta por la celoj de la asocio;

2.2.6 kunlaboro kun oficialaj instancoj kaj aliaj rondoj, asocioj kaj entreprenoj, kiujn interesas kultura kaj internacia aktivado aŭ apogado de la celoj de la asocio;

2.2.7 eldonado de membrogazeto kaj de interreta hejmpaĝo;

2.2.8 tenado de libroservo.

2.3 DEA estas neŭtrala koncerne naciecon, rason, religion, politikon kaj sociajn demandojn, sed devas labori por ebligi al ĉiuj starpunktoj esprimiĝi en la lingvo.

2.4 La laboro por Esperanto devas okazi en plena respekto al la valoroj kaj naturaj aplikkampoj de la naciaj lingvoj.

3. Laborplano

La agado de DEA estas fiksata per laborplano, kiun adoptas la ĝenerala kunveno. Ĉi tiu plano estu laŭeble adaptita al la laborplano de UEA.

4. Membroj

4.1 Kiel aktivaj membroj estas akceptataj:

4.1.1 Esperantosocietoj,

4.1.2 junularaj asocioj,

4.1.3 individuaj personoj, ĉi-poste en la statuto nomataj individuaj membroj,

4.l.4 privataj entreprenoj.

4.2 Kiel kolektivaj membroj estas akceptataj aliaj asocioj kiuj volas apogi la celojn de DEA.

4.3 Honoraj membroj estas nomumeblaj de ĝenerala kunveno laŭ rekomendo de la estraro.

4.4.l Aliĝo de societoj kaj privataj entreprenoj estas anoncataj al la estraro, kiu submetas la aliĝon al la aprobo de la unua estonta ĝenerala kunveno.

4.4.2 Aliĝo de individuaj membroj estas anoncata al la kasisto.

4.4.3 Eksiĝo estas anoncata al la kasisto kaj povas okazi por societoj kaj privataj entreprenoj nur kun trimonata averto efektiviĝanta je la 30-a de junio aŭ la 31-a de decembro, kaj por individuaj membroj kun 14-taga averto efektiviĝanta je la unua de monato.

4.5.1 Kotizoj kaj limdatoj de pago estas fiksataj de la ĝenerala kunveno.

4.5.2 La Esperantosocietoj prezentas ĉiujare antaŭ la 15-a de decembro al la kasisto de DEA ĝisdatigitan membroliston.

4.6.1 La estraro povas eksigi membron kiu ne antaŭ monato post postulo pagos ŝuldatan kotizon por almenaŭ 3 monatoj.

4.6.2 La estraro povas eksigi membron kiu konstraŭlaboras celojn de DEA. La eksigo devas esti komunikita al la koncerna membro skribe kaj kun necesa motivigo. La afero povas esti submetita al ĝenerala kunveno, kie la koncerna membro devas havi la eblecon esprimi siajn komentojn.

5. Garantiado

Asociaj membroj kaj estraranoj ne garantias persone la sindevontigojn de la asocio, kiujn garantias sole la asocio per sia respektiva bonhavo. La membroj de la asocio havas neniun rajton je ia parto de la asocia bonhavo, nek de iu ĝia profito.

6 Estraro

6.1.1 DEA estas gvidata de estraro konsistanta el prezidanto kaj minimume 4 pliaj membroj, kaj konstituanta sin kun vicprezidanto, kasisto kaj sekretario.

6.1.2 Se la prezidanto estas malhelpita, la vicprezidanto anstataŭas lin ĝis la unua estonta ĝenerala kunveno.

6.1.4 Se estrarano eksiĝas el sia posteno dum sia elekto-periodo, unu el la elektitaj anstataŭantoj laŭbezone anstataŭas lin ĝis la unua estonta ĝenerala kunveno.

6.2 La estraro havas kvorumon, kiam pli ol duono de la estraranoj partoprenas. Okaze de voĉdon-egaleco la voĉo de la prezidanto estas decida.

6.3 Pri la decidoj de la estraro estas tenata decid-protokolo kiu estas aprobata de la posta estrar-kunsido.

6.4 La estraro prizorgas ke estu tenataj respondecaj, klaraj kaj korektaj kalkulaĵoj pri la agado de la asocio mem kaj pri la agado de la ceteraj entreprenoj gvidataj de la

asocio. La kalkulaĵa jaro estas la kalendara jaro.

7 Elekto de estraro kaj revizoroj

7.1 La estraro estas elektata de la ĝenerala kunveno.

7.2 La prezidanto estas elektata aparte kaj por periodo de 1 jaro.

7.3 La ceteraj estraranoj estas kune elektataj por periodoj de du jaroj, tiel ke la duono finas periodon ĉiujare. Post tio estas elektataj anstataŭantoj por periodoj de 1 jaro.

7.4 La revizoroj estas kune elektataj por 1-jara periodo. Post tio la anstataŭanto estas elektata por 1-jara periodo.

7.5 La periodo de 1 jaro estu komprenata kiel la tempo inter 2 ordinaraj ĝeneralaj kunvenoj.

8 Subskribreguloj

Aĉeto, vendo aŭ lombardo de domo kaj alpreno de pruntoj povas okazi nur post laŭstatuta decido en la estraro kaj kun la subskribo de la prezidanto kaj de du pliaj estraranoj. Aliokaze la asocio estas devontigata de la prezidanto lige kun alia membro de la estraro.

9. Ĝenerala kunveno

9.1.1 La Ĝenerala kunveno estas la plej alta aŭtoritato de la asocio.

9.1.2 Laŭstatute kunvokita ĝenerala kunveno ĉiam estas decid-kapabla.

9.1.3 Decidoj, escepte de statutŝanĝoj kaj la dissolvo de la asocio, estas faritaj per simpla voĉ-plimulto, kaj okaze de voĉdon-egaleco la voĉo de la prezidanto estas decida.

9.1.4 Pri la intertraktoj kaj decidoj de la ĝenerala kunveno estas ellaborata protokolo kiun aprobas la kunven-gvidinto kaj la estraro.

9.2 Ĉiuj membroj, kaj gastoj invititaj de la estraro, povas ĉeesti la ĝeneralan kunvenon.

9.3.1 Voĉdonan rajton havas nur tiuj kiuj pagis ŝuldatan kotizon.

9.3.2 Eblas voĉdoni per skriba rajtigilo.

9.3.3 Krom se io alia estas fikstia en ĉi tiu statuto aŭ decidata de la ĝenerala kunveno, estas uzata la kvalitmetodo (prioritata metodo) ĉe la voĉdonado.

9.4 Individuaj membroj, privataj entreprenoj kaj la membroj de aliĝintaj societoj ĉeestantaj la ĝeneralan kunvenon havas po 1 voĉon.

10. Ordinara ĝenerala kunveno

10.1.1 Ordinara ĝenerala kunveno okazas 1 fojon en jaro, normale kadre de jarkunveno.

10.1.2 La estraro skribe kunvokas la ĝeneralan kunvenon kun minimume 6-semajna averto. La kunvokon devas akompani provizora tagordo.

10.2 Proponoj inkluzivotaj en la tagordon estas skribe prezentataj al la prezidatno minimume 3 semajnojn antaŭ la ĝenerala kunveno.

10.3 La fina tagordo estas publikigata per la hejmpaĝo de la asocio minimume 1

semajnon antaŭ la ĝenerala kunveno. Membroj kiuj deziras tion, povas ricevi ĝin perpoŝte.

10.4 La raporto de la estraro, kune kun la kalkulaĵo de la pasinta kalkulaĵa jaro, subskribitaj de la prezidanto, de la kasisto kaj de la revizoroj, estas publikigata per la hejmpaĝo au la membrorevuo de la asocio minimume 1 semajnon antaŭ la ĝenerala kunveno. Membroj kiuj deziras tion, povas ricevi ĝin perpoŝte.

10.5 La tagordo submetata de la estraro al la ĝenerala kunveno devas enhavi minimume la jenajn punktojn:
1. Elekto de kunvengvidanto
2. Raporto de la estraro
3. Jara kalkulaĵo
4. Proponoj
5. Elekto de prezidanto
6. Elekto de estraranoj kaj de anstataŭantoj
7. Elekto de 2 revizoroj kaj 1 anstataŭanto
8. Eventualaĵoj.

11. Eksterordinara ĝenerala kunveno

11.1 La estraro povas, kun minimume 4 semajnoj de averto kaj kun indiko de tagordo, kunvoki eksterordinaran ĝeneralan kunvenon.

11.2 La estraro devas, kun minimume 4 semajnoj de avero kaj kun indiko de tagordo, kunvoki eksterordinaran ĝeneralan kunvenon ĝis maksimume 4 semajnoj post kiam minimime 1/4 de la voĉdonrajtaj membroj esprimis deziron pri tio al la prezidanto, indikante la deziratan tagordon.

12. Statutŝanĝoj

Decido pri ŝanĝo de la statuto estas farebla nur de ĝenerala kunveno kun minimume 2/3 de la donitaj voĉoj, kaj nur se propono pri tio estas inkluzivita en ĝustatempe dissendita tagordo.

13. Dissolvo de DEA

13.1 Decido pri dissolvo de DEA estas farebla nur de ĝenerala kunveno kun minimume 2/3 de la donitaj voĉoj, kaj nur se ĝi minimume 1 monaton poste estas samvorte redecidita, aŭ de ĝenerala kunveno kun minimume 2/3 de la donitaj voĉoj, aŭ per simpla plimulto de tutasocia voĉdono, kies formon decidas la ĝenerala kunveno.

13.2 Okaze de dissolvo la bonhavo de DEA transiras laŭ decido de la ĝenerala kunveno al alia dana entrepreno kiu laboras por Esperanto, aŭ al Universala Esperanto-Asocio (UEA).

La ĝenerala kunveno, 26 04.2009